# Esperanto

## 40-a DATREVENO DE LA ESPERANTA SOCIETO DE TENERIFE ( = ESTO)*

(Iru al la hispana versio ➡ )

Æirkaý la 15-a de decembro, kiel æiu jare, la esperantistoj de Tenerife havas sian grandan jarasembleon. En tiu dato, æie en Esperantujo oni memorfestas la librotagon, øi estas bona þanco por renkontiøi per esperanto en la amikeco kaj kulturo. Æiokaze ekzistas alia grava motivo, kiu aldoniøas al la tradicio, ESTO atingas kvardek jarojn ek de la komenco de sia oficialiøo.

Grava estis la jaro 1957 por la historio de Esperanto en Kanarioj, æar ekzistis tiam la adekvataj cirkonstancoj, ni diru, por la decido fondi societon, kiu rezultiøis fundamenta por organizi la kanarian esperantistan komunumon, kiu siatempe ja atingis maturecon kaj forton por tion fari. Alveni al tiun situacion ne estis rozpromenajo, malantaýe estis restinta, eble, la plej malfacila epoko por esperanto kaj øia libera diskonigo. Æar apud la kutimaj malraciaj reagoj de la snobuloj, kiuj kutime kritikas malþate esperanton sen la bazaj konoj pri øia literaturo kaj leksikografio kaj sen ajna eksperto por øin paroli, oni aldoniøis la politikaj persekutoj de iuj totalismaj reøimoj. Ekzemple, en novembro de 1948, la rektoro de la Universitato de La Laguna, S-ro. José Ignacio Alcorta Echevarría, malpermesis esperantan kurson okazintan en la Fakultato de Filozofio kaj Belletroj, kiun ¼us abtaýe akceptis la dekano S-ro. Elías Serra Ràfols kaj gvidita de la siatempe juna profesoro S-ro. Juan Régulo Pérez, post kampanjo kontraýa, kiu finiøis pere de la artikolo ***En casa del herrero...Esperanto*** (=æe forøisto...Esperanton) de la agresema ¼urnalo de SEU (= Hispana Universitata Sindikato) de La Laguna "Arriba España" ( = Hipanio Supren!), æar, inter alia¼oj, en "...framasonaj kaj komunismaj manipuloj esperanto havis reliefajn intervenojn...", kio okazigis, certe, elegantan kaj tujan respondon de Régulo mem kun la artikolo ***El Esperanto***, en la sekvanta numero de la sama ¼urnalo.

La 16$^{an}$ de februaro de 1957 okazis la fondinta asembleo en la Salono de Kunvenoj de la Fakultato de Filozofio kaj Belletroj de la Universitato de La Laguna, kiu troviøis en la centra domo de la tiama Universitato. Estis øia prezidanto la dekano D-ro. S-ro. Elías Serra Ràfols, kiu sin turnis al la æeestantoj kaj centriøis en la speciala motivo de la kunveno "...la neceso doni legalan karakteron al la esperanto movado en Kanarioj...kiu ja havas kelkdekjaran tradicion en la Insuloj, se bone neniam kun la intensa vivo kiun øi havis dum la lastaj jaroj..." La kadro de la Fakultato de Filozofio kaj Belletroj donis al la kunveno deziritan seriozan kaj prestiøan akademian karakteron, sed se ni rimarkas la profesiojn de la æeestantoj -profesoro, instruisto, kudristino, ladisto, me¶anikisto, ktp. - ni avertas la diversecon de øia konsisto. Aldone al la tre rekonataj profesoroj Serra kaj Maynar, en la kunveno sin trovis du homoj, kiuj, ni kredas, estis la veraj impulsantoj de tiu iniciato: S-ro. Juan Régulo kaj S-ro. José Roberto Vivas, tiu æi lasta Venezuela Konsulo en Santa Cruz de Tenerife, kun disvenka entuziasmo kaj memcerta de la utileco de esperanto, lia kunlaboro rezultiøis fundamenta. Régulo, alportis la lingvistikan konon, flaman amon, de "enamitulo", li dirus iam, por esperanto kaj persistemon kaj laboran kapablon surprizantajn; S-ro Vivas, lian prestiøon kaj socian influon, kune al lian kontaøan fervoron kaj personan simpation, kiu solvis ajnan malvarmon, kaj ke, por tiel diri, malfermis pordojn; li prenis sur sin la prezidantecon de la Administranta Komisiono, lian pozitivan sintenon kaj sindonemon dum tiuj jaroj por Esperanto, estis rekonitajn de Régulo, kiu vidas lin kiel "...grandan defendanton de nia afero kaj sindoneman mecenaton..." La burokrataj proceduroj por la legalizo de la Societo daýrus ankoraý øis aýgusto de 1957.

Juan Régulo ofte diris ke hazardo ludas gravan rolon por homa biografio, kaj por tion diri ofertis sian propan eksperton "...la karaktero kaj hazardo interligiøis en mia biografio...", li dirus, kaj efektive, hazardo intervenas foje por helpi kaj foje por tute male. La Administranta Komisiono kunvokis al eksterordinara øenerala asembleo, kiu okazis en þatega loko de la Vega de La Laguna ( = fekunda ebena¼o æirkaý de La Laguna), la 28$^{an}$ de aprilo de 1957; øi estis la unua asembleo de ESTO. S-ro. Vivas estis enpostenigita al supra nivelo en sia diplomatia kariero kaj devonta de¼ori kiel Øenerala Konsulo de sia lando (= Venezuelo) en Napoli, tiel hazardo rompis definitive lian rilaton kun Kanariaj Insuloj, kio, ni komprenas, estis obstaklo sur la suprenmarþado, kiun en tiuj jaroj havis esperanto en æi tiu regiono. Øi estis adiaýa homaøo, þarøita, ni povas diri, de acidodolæa gusto, tiel atingas nin de la propaj rememoroj. Aklame S-ro. José Roberto Vivas y Vivas oni estis nomumita unuan Prezidanton de la Esperanta Societo de Tenerife, tio estis antaýigita decido pro cirkonstancoj, sed øi, sen loko por duboj, estus ripetita en la decembra Asembleo, tiam kun la statutoj ja aprobitaj. La Societo havigas sian tutan legalan funkciadon en la unua Ordinara Øenerala Asembleo de la 15$^{an}$ de decembro de 1957, øi okazis en unu el la aýloj de la Instituto de Kanarioj, institucio tiom ligita al la efemeridoj, kiujn ni nun festas, kie estis elektita sia unua Estraro kaj membriøas 128 anoj, el kiuj 26 estis konsideritaj fondintoj. La anaro de la unua Estraro estis: S-ro. Ángel Pombrol Hernández, prezidanto, S-ro. Ramón Rodríguez Peña, secretario; F-ino. Carmen Felisa Sigú Sigú, kasistino; F-ino. Rosa Rivero Linares,

bibliotekistino; S-ro. Nicolás Pérez Álvarez, unua voædonanto; S-ro. Francisco Rodríguez y Rodríguez, dua voædonanto; F-ino. Encarnación Lara Palenzuela, tria voædonanto; kaj S-ro. José Palmero Pérez, kvara voædonanto.

La vivo de æi tiu Societo certe enradikiøas en la etoso de la urbo La Laguna, æe aliaj pli antkvaj kaj prestiøaj asocioj. Æar ne eblas sintetetizi en nura artikolo æion okazintan en la lastaj kvardek jaroj, ni konformiøas kun substreki kelkajn el la plej gravaj okazinta¼oj. La Esperanta Societo de Tenerife ( = ESTO) helpis projekcii Kanariojn, precipe La Laguna, pere siaj internaciaj rilatoj kaj tiujn kiujn realigas siaj anoj, speciale kun ilia partoprenado en la universalaj kongresoj al kiuj aliøas æiu jare kelkmiloj da kongresistoj el la tuta mondo, æi rilate distingiøas S-ro. Juan Régulo Pérez, pro sia elstara rolo en la monda esperanta komunumo kaj, speciale, pro lia laboro kiel eldonisto de esperantaj libroj. Cirkaýe cent libroj de originalaj kaj tradukitaj verkoj estis eldonitaj de Stafeto dum 22 jaroj funkcianta (1952 - 1974), ankoraý la firmo Stafeto ekzistas, kun sidejo de siaj eldonoj, nome, en La Laguna - Antwerpen - Chapecó.

Aliflanke, la instruado de la esperanta lingvo kaj kulturo estis æiam la unua laboro, ni aldonu ke æi tiuj instruadoj, en liberaj kursoj aý oficialaj, ofertas, plu lerni esperanton, ankaý la þancon, en la plej øenerala senco, levigi la kulturan nivelon de la partoprenanto, pro tio esperanto, por tiel diri, ofte estis efika instrumento por popola klerigado. Grava paþo tiusence estis inkludi esperanton en la Instituto pri lingvoj de la Universitato de La Laguna en 1963, proponon de profesoro Maynar kun subteno, ne malpli grava, de la profesoro Elías Serra Ràfols, siatempe ambaý dekanoj, kaj ankaý de la rektoro S-ro. Antonio González y González, kiu puþis la unuaniman kunsenton de la Universitata Estraro tiusence. La profesoro S-ro. Juan Régulo estis la direktoro de la esperanto katedro, kadre de la Instituto de Idiomoj, situacio kiu pluekzistis øis øia æesigo en 1981, estis 18 jaroj de bonega laboro. Flanke de La Universitato de La Laguna kaj de la Esperanta Societo estas la deziro klopodi por restauri la esperantajn universitatajn kursojn kaj por tion atingi okazis, lastatempe, kunsidoj inter la du partoj kun tre bonaj perspektivoj, atingi tion estus, ni komprenas, rektifiki situacion, kiu ne faras juston nek por esperanto nek kun la profesoroj, kiuj siatempe atingis øian æeeston kadre de nia Universitato. La Esperanta Societo partoprenis ankaý en la socia vivo pere de aliaj rimedoj kun kulturaj iniciativoj, filantropaj, ktp. Ni prinotu la organizadon de du Naciaj Kongresoj de Esperanto kun sidejo en La Laguna -1969 kaj 1991 -; la filatela ekspozicio honore al Pastro Anchieta ( = fondinto de Saõ Paulo, Brazilio, naskiøis en La Laguna en 1534 kaj mortis en Reritiba -Brazilio- en 1597), La Laguna, 1965; la kanaria esperanta renkontiøo, Las Palmas 1977; la flortapiþoj okaze de la Korpofesto de La Laguna ekde 1960 seninterompe, ktp.

Esperanto ne æesigis sian propagadon ekde la apero de sia gramatiko en 1887, lante sed sen pauzo, sia valido kiel vehikla lingvo, ni kredas, fariøis sendemanda, super æio en la nunaj momentoj ke la internaciaj komunikadoj estas tute necesaj. Pro siaj kondiæoj por facila lernado kaj logika racio, oni devas, laý nia kompreno, esti adoptita kiel dua lingvo, kio permesos la adekvatan komunikadon en socio en kiu, mondskale, regas multlingvismo. Por la nuna generacio de esperantistoj, membroj de internacia komunumo propavole akceptita, sen la etna nek teritoria deveno de la naciaj lingvoj, esperanto sinprezentas kiel valida alternativo, kies uzo kaj fleksebleco estis sufiæe konstatitaj dum la longa jarcento de sia ekzistado. Cirkonstance, æiu tage estas pli nature ke multaj lingvistikistoj el la tuta mondo interesiøas serioze por la studado de esperanto en øiaj multfacetoj, estas ekzemplo la itala semiologo Umberto Ecco, kiu dediæis parto de lia libro *La ricerca della lingua perfetta* al Esperanto, en la Universitato de Budapest funkciis grava Fako de Esperanto ekde 1966, ankaý la Cibernetika Instituto en la Universitato de Paderborn, Germanio, oni faris seræadojn, gvide de Dr. Helmar Frank, rilate al la edukaj efektoj de esperanto, tra periodo de dudek jaroj, aliflanke oni ofertas kursojn en pluraj universitatoj de Francio, Austria, Italia, Holanda - Katedro de Esperanto e Interlingvistiko en Amsterdam-, USA, Hispanio, ktp. Tamen estis la perkomputila projekto, fare de firmao BSO inter 1983 kaj 1990, uzante esperanton kiel peranta lingvo, kiu kreis pli da esperoj en la akademiaj laboroj pri esperanto. Multaj pli estus la ekzemploj ke ni povus alporti, kion ni rezignas favore de la dezirebla þparemo de informoj en iu skriba¼o de æi tiu karaktero.

En æi tiuj cirkonstancoj la Esperanta Societo de Tenerife, gvidita de sia Estraro, pretendas alfronti la jarcentfinon kun espero, sindonemo kaj laboro, deziras pligrandigi, se eble, sian kontribuon por fortigi la fratajn rilatojn, sen limoj lingvistikaj aý de alia tipo, inter æiuj homoj kaj landoj de la mondo.

* "EL DÍA" ( = LA TAGO) Santa Cruz de Tenerife, 1997.

---

Leandro Trujillo Casañas en sia prelego *Juan Régulo kaj Esperanto - junio de 2000 -*



Returnu al indekso

---

Lasta øisdatigo 30 de decembro de 2001 de Leandro Trujillo Casañas